



Boletín

n° 441 Enero - Marzo 2023



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 441

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

	Estraro
Prezidanto:	Ángel Arquillos López
Vicprezidanto:	Alberto Granados Orcero
Sekretario:	Manuel Parra
Vicsekretario	Isidoro Ortega López
Kasisto.	Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj:	Vicente Manzano (Viko)
“	Ana Manero

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: Guaroa Emmanuel González.

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Krom informado pri la Ĝenerala Kunsido kaj la Kontoj de nia Federacio, en la nuna "Boletín" vi trovos interesajn novaĵojn pri la Movado, kiel diversaj eventoj kaj ĉefe, novaĵoj pri la venonta HEK, okazonta en la monato oktobro en la belega urbo Sevilo. Bedaŭrinde la preparoj ne rapidas tiom kiom dezirinde, sed ĉio bonordas, ĉar la ĉefaj aferoj kiel la kongresejo en la urbocentro estas solvitaj. Mi scias ke la LKK ege laboras kaj okupiĝas pri la aŭto, ekskursoj, prelegantoj, artistoj, ktp. Pri tiaj gravaj averoj vi ricevos ampleksan informon pere de la venonta Boletín, kaj pri tio mi okupiĝos, sed ne hezitu aliĝi antaŭ la 30-a de aprilo por profiti la rabaton.

Denove mi petegas vian kontribucion per mallongaj aŭ longaj tekstoj pri Esperanto aŭ simple pri interesa temo, kvankam Boletín estas informilo de la Federacio, en ĝi estas loko por ĉiaj temoj kaj nur vi karaj legantoj povas kaj rajtas kontribui per ideoj novaĵoj, desegnaĵoj kaj eĉ spritaĵoj, kiuj ĉiam estas bonvenaj.

Mi atendas vian respondon

Ángel Arquillos
Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Asamblea General Extraordinaria	3
Raporto pri Aktivaĵoj	4
HEF spezokontoj 2022	9
HEF-Buĝeto 2023	10
HEK 2023 alproksimiĝas	14
Pri grupoj kaj Asocioj	15
Artikolo pri junulara volontulado per Esperanto	18
Nova fasono de la retkatalogo	18
Dokumentoj alvenitaj al la retkatalogo en 2022	19
La tunelo de La Engaña	20
Omaĝe al Lorca	22
La Stranga Angulo, ĉapitro 8	26
La Mediteranea Esperanto-Semajno “Les Issambres”	28
Matematika Angulo, La Teoremo de Pitagoro (10)	31



ALIĜU AL LA HISPANA KONGRESO: kongreso.esperanto.es

ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA

(La asamblea general ordinaria tendrá lugar en octubre, en el marco del congreso en Sevilla.)

El Presidente de la Federación Española de Esperanto convoca a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Extraordinaria, que tendrá lugar el domingo 21 de mayo de 2023, a las 11:00 horas por internet (sistema Skype), con el siguiente orden del día:

- 1.- Aprobación del acta de la anterior asamblea (1 de mayo de 2022)
- 2.- Elección del nuevo vocal por la sección juvenil
- 3.- Aprobación de las cuentas y tesorería del 2022
- 4.- Aprobación de la Memoria de Actividades del 2022
- 5.- Informe de los socios
- 6.- Aprobación del Presupuesto para 2023
- 7.- Proyectos para 2023
- 8.- Ruegos y preguntas

IMPORTANTE: El enlace para conectarse se comunicará unos días antes mediante la lista de correo <hefanaro@esperantujo.io>

Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico: admin@esperanto.es, antes del 20 de mayo.

El Presidente de la Federación: Ángel Arquillos López

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

(La ordinara Ĝ.K. okazos oktobre, kadre de la kongreso en Seviljo.)

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 21-an de majo de 2023 (dimanĉe), je la 11:00 horo, per interreto (sistemo Skajpo), laŭ la jena tagordo:

- 1.- Aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (1a de majo 2022)
- 2.- Elekto de nova voĉdonanto pri la junulara sekcio
- 3.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2022
- 4.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2022
- 5.- Informo pri la anaro
- 6.- Aprobo de la Buĝeto por 2023.
- 7.- Projektoj por 2023
- 8.- Sugestoj kaj demandoj

GRAVAJ RIMARKOJ: La ligilon por konektiĝi oni komunikos kun kelk-taga anticipe per la retlisto <hefanaro@esperantujo.io>

La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retpoŝta adreso admin@esperanto.es, antaŭ la 20-a de majo.

La Prezidanto de HEF: Ángel Arquillos López

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ EN 2022

1. INTERNA ADMINISTRADO

- 1.1. En 2022 la estraro kunsidis tri fojojn, ĉiam en virtuala maniero.
- 1.2 Pro demisio de la estrarano William Guerrero en septembro, la estraro elektis kiel provizoran anstataŭanton la novan prezidanton de HEJS: Emmanuel González.
- 1.3. Okazis ordinara ĝenerala kunveno de ĉiuj membroj en majo kadre de la 80a Hispana Kongreso en Comillas.
- 1.4. Oni eldonis tri numerojn de la organo “Boletín” (numeroj 437, 438 kaj 439).
- 1.5. La biblioteko *Juan Regulo Pérez* daŭre estas alirebla de ĉiuj interesatoj, tamen nur HEF-anoj rajtas pruntepreni. Ĝi riĉiĝis per 25 novaj titoloj, nur 2 el ili aĉetita, la ceteraj donacitaj aŭ interŝanĝitaj.

2. ASOCIOJ

- 2.1. Fondaĵo Esperanto aljuĝis monhelpojn al tri lokaj grupoj por instruado kaj skanado de arĥivo, per la tuta sumo de 1.000 eŭroj.
- 2.2. La lokaj kaj regionaj grupoj daŭrigas sian funkciadon.

3. INSTRUADO KAJ TREJNADO

- 3.1. La Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) denove ofertis kursojn de Esperanto en la lernojaro 2022-2023, en la niveloj A2 kaj B1. Ĉi tiuj kursoj estas kunorganizitaj de HEF per interkonsento subskribita oficiale kun la universitato. HEF zorgas pri la selektado de instruistoj, pretigas kriteriojn kaj ellaboras la materialon. HEF havigas propran diplomon al sukcesintoj de la kurso kiuj tion petas.
- 3.2. Instigite de membroj de HEF, la universitato de Sevilo organizas kursojn de Esperanto en la lernojaro 2022/2023, malfermajn por ĉiu homo interesita. Ili estas senpagaj, kaj povas taŭgi por ricevi poentojn (créditos) en la oficiala studado de la universitato.
- 3.3. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato, precipe organizitaj de la lokaj kluboj.

4. KONGRESOJ

Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj

4.1. La 80a Hispana Kongreso okazis en Comillas (Kantabrio) de la 29^a de aprilo ĝis la 2^a de majo, kun varia programo, kun aktivaĵoj instituciaj, distraj, kulturaj, kun prelegoj, koncertoj, teatro, prezento de pluraj novaj libroj, kvizo, atelieroj kaj filmoj.

4.2. E-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta ŝtato meze de decembro.

Partoprenataj de membroj de HEF

4.3. Kelkaj membroj de HEF partoprenis la universalan kongreson okazintan en Montrealo. Kadre de ĝi, en la Movada Foiro estis prezentita nia Federacio per propra budo, kun ekzempleroj de la organo Boletín kaj kelkaj libroj eldonitaj de HEF.

5. INSTITUCIA KUNLABORO

5.1. La retejo HispanaPRO, de la ministrejo pri kulturo, publikigis ampleksan kaj bele ilustritan artikolon pri Esperanto: <https://hispanapro.mecd.es/los-inicios-del-esperanto/>

La artikolo aperis ankaŭ en la blogo de Europeana en du lingvoj: en la hispana (<https://www.europeana.eu/es/blog/how-esperanto-started-and-developed>) kaj en la angla (<https://www.europeana.eu/en/blog/how-esperanto-started-and-developed>).

5.2. Dum 2022 parto de la katalogo de nia biblioteko aneksiĝis al *Catálogo Colectivo del Patrimonio Bibliográfico Español* (la kolektiva katalogo de la bibliografia heredaĵo) de la ministerio pri kulturo.

<http://catalogos.mecd.es/CCPB/cgi-ccpb/abnetopac/O12205/ID888c9982?ACC=101>

5.3 HEF partoprenis la kampanjon de UEA kaj Eŭropa Esperanto-Unuiĝo por apogi Esperanton en la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo, per sendo de poŝtkartoj, speciale eldonita de UEA, al dekunu hispanaj eŭroparlamentanoj kiuj estis partoprenontaj la plenkunsidojn de tiu Konferenco. Reagoj ne venis. Per tiu Konferenco, Eŭropa Unio invitas siajn civitanojn proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere la EU evoluu.

5.4 Teamo de HEF-membroj prizorgis la esperantan tradukadon de scienca lerneja kalendaro 2023, laŭ peto de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC). El ĝia retejo <https://digital.csic.es/handle/10261/285166> eblas elŝuti la kalendaron.

5.5 La 21an de aprilo du esperantistoj partoprenis en la sinsekva legado de la verko Don Quijote, tradicie organizata de *Círculo de Bellas Artes* en Madrido. Ili legis po pecon de la verko en la esperanta traduko.

6. ELDONADO

En la jaro 2022 HEF eldonis neniun libron.

7. DISVASTIGO

Ekspozicioj

La kolekto de paneloj estis montrita inter la 18a kaj 20 de marto en la Municipa Biblioteko de Albarracín (Teruelo); kaj de la 29a de aprilo ĝis la 19a de junio en la kultura centro de Comillas (Kantabrio).

Prelegoj

La 17a de januaro juna membro de HEF estis intervjuita pri esperantaj temoj en kultura kunsido, en Rivas-Vaciamadrid, kun projekciado de bildoj.

La 4an de aprilo la grupo de Valencio organizis prelegon pri Esperanto en la Universitato,

La 22an de aprilo en la sidejo de HEF la profesoro pri sociologio Roberto Garvía prezentis sian libron "Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España [1890-1936]" pri la historio de la hispana esperantista movado.

La 9an de novembro okazis prelego pri Esperanto en la kultura centro Malatesta de Bilbao.

RETOJ SOCIAJ KAJ RETEJO 8

8.1. HEF-retpaĝo: dum 2022 ĝi ricevis averaĝe 608 vizitojn semajne.

8.2. Sociaj retoj: HEF kaj HEJS havas kontojn en *Facebook* (pli ol 2.000 ŝatantoj) kaj *Twitter* (pli ol 1.900 sekvantoj), kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivajtoj kaj pri Esperanto. Oni aldonis pliajn videojn al la kanalo de HEF en *Youtube* kaj ĝi jam havas 2.430 abonantojn. Ankaŭ funkcias diskutkanalo en *Telegram* de la junulara sekcio HEJS.

8.4. Bitoteko: HEF plu flegas la bitan bibliotekon, Bitoteko, kies materialo estas alirebla rete, kaj kiu apartenas al la oficialaj retoj Hispana kaj Europeana. Dum 2022 oni aldonis 247 novajn erojn diversajn.

8.5. Daŭris la sendado de la "Bitbulteno", informilo sendata restpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj. Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta); dum 2022 aperis ok numeroj, kaj la nunaj ricevantoj estas pli ol mil.

8.6. Ĉe la adreso info@esperanto.es oni respondis petojn de informo kaj de malgrandaj tradukoj.

9. AMASKOMUNIKILOJ

9.1. La gazetara servo de HEF sendis tri gazetarajn komunikojn al pli ol 1.200 ĵurnalaj retadresoĵ tra la tuta lando: en februaro okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo; en julio okaze de la Esperanto-tago, kaj en septembro okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj.

9.2. Sekve al tiuj komunikoj aŭ aliaj agadoj, aperis dum 2022 multaj notoj aŭ artikoloj pri Esperanto en ĵurnaloj (kaj paperaj kaj retaj). Ankaŭ aperis raporto en la regiona televido de Aragono kaj en kelkaj regionaj aŭ lokaj radio-elsendejoj.

10. AGADOJ DE LA HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

En septembro de 2022 HEJS elektis novan prezidanton: Emmanuel González, pro demisio de la antaŭa.

La 17an de januaro membro de HEJS estis intervjuita pri esperantaj temoj en kultura kunsido, en Rivas-Vaciamadrid, kun projekciado de bildoj.

Kelkaj membroj de HEJS, la junulara sekcio de HEF, partoprenis en la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis julie en Nederlando.

11. ALIAJ KULTURAJ AKTIVAĴOJ

10.1 Du membroj de HEF, la elstaraj verkistoj kaj tradukistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutierrez Adúriz plu aktivas kiel Prezidanto kaj Sekretario, respektive, de la skipo de gvidantoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

Manuel Parra, sekretario
9



ALIĜU AL LA HISPANA KONGRESO: kongreso.esperanto.es

HEF-SPEZOKONTO 2022

<u>ENSPEZOJ</u>	<u>2022</u>	<u>2021</u>	<u>DIFERENCO</u>
HEF-KOTIZOJ	5.892,00	5.887,00	5,00
UNED-KURSO	5.216,00	6.155,00	-939,00
LIBRO-SERVO	1.156,00	1.254,14	-98,14
Mondonaco I.V. por Fundación Eo.	500,00	0,00	500,00
MEL-UZO SIDEJO 2021 kaj 2022	300,00	0,00	300,00
MONDONACOJ	7,00	19,00	-12,00
SUBVENCIO FUNDACIÓN Eo.		1.100,00	-1.100,00
<u>SUMO ENSPEZOJ:</u>	<u>13.071,00</u>	<u>14.415,14</u>	<u>-1.344,14</u>

<u>ELSPEZOJ</u>	<u>2022</u>	<u>2021</u>	<u>DIFERENCO</u>
UNED-KURSO (Instruistoj)	3.912,00	4.616,25	-704,25
BOLETÍN (+ Kovertoj)	3.321,45	3.352,91	-31,46
KOMPUTILAJOJ	1.627,29	1.620,22	7,07
NAJBARARA KOMUNUMO	796,92	730,51	66,41
Mondonaco al Fundación Eo. (I.V.)	500,00	0,00	500,00
TELEFONO	487,56	476,00	11,56
BANKMAKLERAJOJ	281,23	295,80	-14,57
LIBROĈETOJ	228,00	94,00	134,00
ELEKTRO	220,61	220,85	-0,24
UEA-KOTIZOJ	201,78	216,60	-14,82
SIDEJA ASEKURO	167,89	165,10	2,79
POŝTO	162,97	354,79	-191,82
EEU-KOTIZO	144,00	152,25	-8,25
PROPAGANDO	94,63	0,00	94,63
LIBROELDONOJ	0,00	2.830,79	-2.830,79
SUBTENO Kurso Kolombia E-Ligo	0,00	1.000,00	-1.000,00
FAKTURO NEPAGITA-IJK 2018	0,00	730,00	-730,00
INKO POR PRINTILO (Sidejo)	0,00	21,99	-21,99
BITA CERTIGILO	0,00	20,90	-20,90
DONACO LIBROJ AL UEA (Sendo)	0,00	10,81	-10,81
<u>SUMO ELSPEZOJ:</u>	<u>12.146,33</u>	<u>16.909,77</u>	<u>-4.763,44</u>

SALDO 31/12/2021:	54.122,76
FINA REZULTO 2022:	924,67
SALDO 31/12/2022:	55.047,43

PODETALE (31/12/2022):

BBVA	49.201,51
TRIODOS	3.581,07
PAY PAL	1.097,82
UEA-konto	694,46
MADRIDA KASO	472,77
<u>SUMO:</u>	<u>55.047,43</u>

HEF-BUĜETO 2023

ENSPEZOJ

HEF-KOTIZOJ	6.000,00
UNED-KURSO	5.000,00
LIBRO-SERVO	2.000,00
H. KONGRESO SEVILLA	300,00
MEL-UZO SIDEJO	150,00
ALIAJ	550,00

SUMO:

14.000,00

ELSPEZOJ

UNED-KURSO (Instruistoj)	4.000,00
BOLETÍN	3.000,00
KOMPUTILAĴOJ	2.500,00
PROPAGANDO	1.000,00
NAJBARARA KOMUNUMO	800,00
TELEFONO	500,00
LIBROAĈETOJ	400,00
OFICEJAJ MATERIALOJ	300,00
BANKMAKLERAJĴOJ	300,00
ELEKTRO	250,00
UEA-KOTIZOJ	220,00
POŝTO	200,00
SIDEJA ASEKURO	150,00
EEU-KOTIZO	160,00
ALIAJ	220,00

SUMO:

14.000,00

Cuenta de resultados abreviada 2022
FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

	(Debe) Haber	
	Ejercicio N	Ejercicio N-1
	2022	2021
A) EXCEDENTE DEL EJERCICIO		
1. Ingresos de la entidad por la actividad propia	13.071,00	14.415,14
a) Cuotas de asociados y afiliados	5.892,00	5.887,00
b) Aportaciones de usuarios	7.179,00	7.428,14
c) Ingresos de promociones, patrocinadores y colaboraciones		
d) Subvenciones imputadas al excedente del ejercicio	0,00	1.100,00
e) Donaciones y legados imputados al excedente del ejercicio		
f) Reintegro de ayudas y asignaciones		
2. Ventas y otros ingresos ordinarios de la actividad mercantil		
3. Ayudas monetarias y otros **	0,00	0,00
a) Ayudas monetarias		
b) Ayudas no monetarias		
c) Gastos por colaboraciones y del órgano de gobierno		
d) Reintegro de subvenciones, donaciones y legados*		
4. Variación de existencias de productos terminados y en curso de fabricación **	-448,00	7.801,00
5. Trabajos realizados por la entidad para su activo		
6. Aprovisionamientos *		
7. Otros ingresos de la actividad		
8. Gastos de personal *		
9. Otros gastos de la actividad *	-12146,33	-16909,77
a) Servicios exteriores	-12146,33	-16909,77
b) Tributos		
c) Pérdidas, deterioro y variación de las provisiones por operaciones comerciales		
d) Otros gastos de gestión corriente		
10. Amortización del inmovilizado *		
11. Subvenciones, donaciones y legados de capital traspasados a resultados del ejercicio	0,00	0,00

12. Excesos de provisiones		
13. Deterioro y resultado por enajenación de inmovilizado **	0,00	0,00
a) Deterioros y pérdidas		
b) Resultados por enajenaciones y otras		
A.1) EXCEDENTE DE LA ACTIVIDAD (1+2+3+4+5+6+7+8+9+10+11+12+13)	476,67	5.306,37
14. Ingresos financieros		
15. Gastos financieros *		
16. Variaciones de valor razonable en instrumentos financieros **		
17. Diferencias de cambio **		
18. Deterioro y resultado por enajenaciones de instrumentos financieros **		
A.2) EXCEDENTE DE LAS OPERACIONES FINANCIERAS (14+15+16+17+18)	0,00	0,00
A.3) EXCEDENTE ANTES DE IMPUESTOS (A.1 + A.2)	476,67	5.306,37
19. Impuestos sobre beneficios **		
A.4) VARIACION DE PATRIMONIO NETO RECONOCIDA EN EL EXCEDENTE DEL EJERCICIO (A.3 + 19)	476,67	5.306,37
B) INGRESOS Y GASTOS IMPUTADOS DIRECTAMENTE AL PATRIMONIO NETO		
1. Subvenciones recibidas		
2. Donaciones y legados recibidos		
3. Otros ingresos y gastos**		
4. Efecto impositivo**		
B.1) VARIACIÓN DEL PATRIMONIO NETO POR INGRESOS Y GASTOS RECONOCIDOS DIRECTAMENTE EN EL PATRIMONIO NETO (1+2+3+4)	0,00	0,00
C) RECLASIFICACIONES AL EXCEDENTE DEL EJERCICIO		
1. Subvenciones recibidas*		
2. Donaciones y legados recibidos*		
3. Otros ingresos y gastos**		
4. Efecto impositivo**		
C.1) VARIACIÓN DEL PATRIMONIO NETO POR RECLASIFICACIONES AL EXCEDENTE DEL EJERCICIO (1+2+3+4)	0,00	0,00
D) VARIACIONES DE PATRIMONIO NETO POR INGRESOS Y GASTOS IMPUTADOS DIRECTAMENTE AL PATRIMONIO NETO (B.1+C.1)	0,00	0,00
E) AJUSTES POR CAMBIO DE CRITERIO		
F) AJUSTES POR ERRORES		
G) VARIACIONES EN EL FONDO SOCIAL		
H) OTRAS VARIACIONES		
I) RESULTADO TOTAL, VARIACIÓN DEL PATRIMONIO NETO EN EL EJERCICIO (A.4+D+E+F+G+H)	476,67	5.306,37

Balance abreviado 2022

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

	Ejercicio N	Ejercicio N-1
ACTIVO	2022	2021
A) ACTIVO NO CORRIENTE	62.390,91	62.390,91
I. Inmovilizado intangible.		
II. Bienes del Patrimonio Histórico.	2.289,70	2.289,70
III. Inmovilizado material.	60.101,21	60.101,21
IV. Inversiones inmobiliarias.		
V. Inversiones en entidades del grupo y asociadas a largo plazo.		
VI. Inversiones financieras a largo plazo.		
VII. Activos por impuesto diferido.		
B) ACTIVO CORRIENTE	66.913,43	66.436,76
I. Existencias.	11.866,00	12.314,00
II. Usuarios y otros deudores de la actividad propia.		
III. Deudores comerciales y otras cuentas a cobrar.		
IV. Inversiones en entidades del grupo y asociadas a corto plazo.		
V. Inversiones financieras a corto plazo.		
VI. Periodificaciones a corto plazo.		
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes.	55.047,43	54.122,76
TOTAL ACTIVO (A+B)	129.304,34	128.827,67

Balance abreviado 2022

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

	Ejercicio N	Ejercicio N-1
PATRIMONIO NETO Y PASIVO	2022	2021
A) PATRIMONIO NETO	129.304,34	128.827,67
A-1) Fondos propios	129.304,34	128.827,67
I. Fondo Social.	128.827,67	123.521,30
1. Fondo Social.	128.827,67	123.521,30
2. Fondo Social no exigido *		
II. Reservas.		
III. Excedentes de ejercicios anteriores **		
IV. Excedente del ejercicio **	476,67	5.306,37
A-2) Ajustes por cambio de valor. **		
A-3) Subvenciones, donaciones y legados de capital y otros.		
B) PASIVO NO CORRIENTE	0,00	0,00
I. Provisiones a largo plazo.		
II. Deudas a largo plazo.		
III. Deudas con entidades del grupo y asociadas a largo plazo.		
IV. Pasivos por impuesto diferido.		
V. Periodificaciones a largo plazo.		
C) PASIVO CORRIENTE	0,00	0,00
I. Provisiones a corto plazo.		
II. Deudas a corto plazo.	0,00	0,00
III. Deudas con entidades del grupo y asociadas a corto plazo.		
IV. Beneficiarios-Acreedores		
V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar.	0,00	0,00
VI. Periodificaciones a corto plazo		
TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO (A+B+C)	129.304,34	128.827,67

HEK 2023 ALPROKSIMIĜAS

La LKK de la venonta landa kongreso de Esperanto en nia lando, daŭrigas sian laboron por atingi allogan eventon por la diversaj sektoroj de la Esperantistaro.

En la lasta kunveno de la organizantoj, estis definitive difinita la strukturo de la kongreso, kaj ni povas informi, ke okazos agadoj ne nur dum la kongreso sed ankaŭ la tagojn antaŭ kaj post la kongreso, konformante antaŭkongreson, la 10-an kaj 11-an de oktobro, (kalkulante kun partopreno de interesaj prelegantoj el nia lando kaj aliaj landoj, kaj ankaŭ esperanto-profesoroj el la universitato), kaj postkongreson preter la 15-an de oktobro.

Oni faris ankaŭ, horan strukturadon de la tagoj de la kongreso, estante inkluzivitaj agadoj kiel prelegoj, librovendeja servo, ludoj kaj aliaj distraj agadoj, konstanta ekspozicio de afiŝoj, kulturaj vizitoj, paralelaj kunvenoj de diversaj asocioj, Festo de la Centjaro de la Sevila Esperanto Asocio, Muzika Finfesto kaj pluraj pliaj rubrikoj kiuj estos baldaŭ precizigitaj.

Lastatempe aperis la oficiala retpaĝo de la kongreso kun la aliĝilo kaj la infirmo de la aspektoj kiuj ĝis nun estas konfirmitaj.

Aliĝprezoj similaj al la lasta landa kongreso estis konservitaj kaj ankaŭ la respondaj rabatoj por frua aliĝo kaj aliaj kaŭzoj, por ke tiuj kiuj planas partopreni la kongreson povu jam registriĝi kun interesaj rabatoj.

Aliflanke oni administras informan servon kun vojaĝ-agentejo, kie la aliĝintoj povu konsulkti eblecojn kaj prezojn por loĝado kaj vojaĝoj.

Fine, diri ke ankaŭ estas intertraktado kun la muzika kompanio Vinilkosmo por la de decido de esperanta muzika prezentado.

Resume, la LKK jam plene aktivas, precizigante ĉiutage agadojn kaj kontinue ĝisdatigante la respondan retpaĝaron.

La reta ligilo al la oficiala paĝo de la kongreso estas jena: kongreso.esperanto.es

LKK

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Malago



En la pasinta monato de februaro, nia grupo de la urbo Malago, ĝuis la viziton de du karaj gesamideanoj el Francio, Elizabet kaj Pedro, kiuj vojaĝis tra kelkaj urboj de Andaluzio, inter ili Kordovo kaj Malago. Kaj kiel kutime ni profitis la okazon babiladi en Esperanto dum nia promenado apud la Mediteranea Maro, kie la manĝo estas pli bongusta. Tio okazis la 18an kaj 19an, kaj kvin tagojn poste alvenis surprize Tanya, poliglota juna esperantistino el Bulgario, kiu ankaŭ akompanis nin en la kafejo Esperanto

kaj vojaĝis tra kelkaj urboj de nia bela regiono.

Fuenlabrada

EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN FUENLABRADO

Dum la tuta monato marto eblis viziti en Fuenlabrada (en la Madrida regiono) la ekspozicion "Esperanto, lingvo kaj kulturo". La loko estas la centro por instruado de plenkreskuloj, CEPA Paulo Freire, en la strato Creta num. 2 (proksime al la metro- kaj trajn-stacio "Fuenlabrada Central"), malfermita de 9,30 ĝis 21,00 h, lunde ĝis vendrede.

La ekspozicio estis inaŭgurita la 2an de marto per prelego titolita "Esperanto. Ekolingvismo" kaj estis malfermita ĝis la 31a de marto.



Exposición 1-31 de marzo CEPA Paulo Freire C/de Creta 2 Fuenlabrada (Madrid)	Inauguración Conferencia Salón de actos 2 de marzo 18:00 horas
---	---



KATALUNIO

KONFERENCO PRI ESPERANTO EN UNIVERSITATO DE BARCELONO

La 2an de marto disvolviĝis konferenco pri Esperanto, plurlingvismo kaj sociaj movadoj en Barcelono, organizita de la Departamento pri Angla Filologio kaj Ĝermaniko de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono kaj la Filologia Sekcio de la Instituto pri Katalunaj Studoj, en ties ĉi sidejo.



Prelegis la profesoroj Roberto Garvía, de la Universitato Karolo la 3a, kaj Guilherme Fians, de la Universitato Saint Andrews, kaj sekve disvolviĝis ronda tablo, kun partopreno de la antaŭaj kaj de la profesoroj Monica Heller, Maria Rosa Garrido, Nicolau Dols kaj Xavier Alcalde.

Vespere estis organizita gvidita promeno tra la stratoj de la kvartalo Gràcia, sekvante la historionde Esperanto kaj aliaj sociaj movadoj en tiu historia kvartalo.

La prezentojn kaj la debaton eblas spekti en tiu ĉi ligilo: <https://www.youtube.com/live/WGY02mHyF5k>.

Kelkajn tagojn antaŭe Xavier Alcalde estis publikiginta artikolon en la blogo de la Revuo pri Lingvo kaj Juro de la kataluna registaro, pri Esperanto kaj ĝia nuna stato, kiun eblas legi (katalunlingve) en jena ligilo: <https://gen.cat/3YQYIcN>.

MADRIDA REGIONO

FERMO DE LA KONKURSO DE DEBATO EN FUENLABRADO

Kiel ni informis en pasinta numero, la delegitaro por la sudo de Madrida regiono de la Universitato UNED, kune kun kelkaj urbestroj de tiu regiono organizis konkurson pri debato en lernejoj ("liga de debate escolar"), kiu en la municipa fazo de Fuenlabrado temis pri la ebla rolo de Esperanto en eŭropuniaj institucioj ("La UE tiene 24 lenguas oficiales; ¿debería ser el esperanto el número 25?").

Tiu fazo finiĝis la 29an de marto en municipa teatro. La debato evidentiĝis tre altnive-la, kun granda laboro de la lernantoj kaj instruistoj enplektitaj. La konkurson gajnis la Centro Salvador Dalí, kiu cetere estis la lernejo profitinta el la helpo de nia juna amiko Jorge Brasal, post ilia peto al la esperantistaj asocioj.

La disdonon de premioj ĉeestis la sekretario de Hispana Esperanto-Federacio, Manuel Parra, kaj la direktoro de Fondaĵo Esperanto, José Antonio del Barrio, kiuj parolis al la ĉeestantoj por gratuli la partoprenintojn, kaj por danki la iniciaton de la urbestro. HEF ricevis kunmemoran donacon, fare de la skabeno de edukado, Isidoro Ortega.



VALENCIO

BIOGRAFIO DE ESPERANTISTA PIONIRO

La urbestro de Cheste (Valencia regiono) eldonis la biografion de la esperantisto de tiu urbo Francisco Máñez, verkita de la historiisto José Vicente Castillo. Máñez estis fascina figuro, kamparano kiu tre aktivis en la periodo antaŭ la interna milito por antaŭenigi Esperanton, kreante tiel semon kiu konserviĝis ĝis nun.



La libro estis prezentita la 20an de januaro, en la sidejo de loka ŝparkaso. Oni povas legi ampleksan raporton pri la verko kaj la prezentado en la retejo de la Urbestro

ARAGONO

PREZENTADO DE LIBRO EN ALCAÑIZ

La 9an de februaro oni prezentis en la urbo Alcañiz (provinco Teruelo, Aragono) la libron "Esperanto kaj esperantistoj en Teruel". La agado okazis en salono de la kultura institucio Liceo de Alcañiz, organizita de loka asocio Otras Miradas, kaj ĝin partoprenis la aŭtoro, Serafin Aldecoa, kaj la prezidanto de Liberano, la teruela esperantista asocio, Alberto Granados.

"Esperanto kaj esperantistoj en Teruel" estas dulingva verko eldonita de Liberano, verkita en la hispana de prestiĝa loka historiisto Serafin Aldecoa kaj tradukita en Esperanton de Alejandro Pareja, kiu pritraktas la komencojn, historion kaj ĉefajn rolulojn de Esperanto en la provinco Teruelo, ekde la unuaj jardekoj de la 20a jarcento ĝis la nuntempo.

ARTIKOLO PRI JUNULARA VOLONTULADO PER ESPERANTO



La prezidanto de la junulara sekcio de la Federa-
cio, Manu Guaroa, publikigis artikolon pri sia
sperto pri volontulado pere de Esperanto, en la
retejo europajoven.org, de la servo por junularo
de la urbestro de Madrido. La titolo estas:
“Esperanto, lingvo plena je ŝancoj: mia sperto pri
volontulado en Roterdamo”. Vi povas legi ĝin per
jena ligilo: [https://www.europajoven.org/
experiencia/esperanto-una-lengua-llena-de-
oportunidades-mi-experiencia-de-voluntariado-
en-rotterdam/](https://www.europajoven.org/experiencia/esperanto-una-lengua-llena-de-oportunidades-mi-experiencia-de-voluntariado-en-rotterdam/).

Anglan version publikigis la portalo de la
eŭropunia junulara servo ĉe
<https://youth.europa.eu/stories/>.

NOVA FASONO DE LA RETKATALOGO

HEF ĵus renovigis la fasonon de sia biblioteka retkatalogo. Nun ĝi aspektas pli bunta kaj alloga.

Krom la ĉefaj servoj, informo pri la enhavo de la biblioteko kaj provizado de bibliote-
kaj rikordoj por aliaj bibliotekoj, nun enestas kelkaj aliaj. Ekzemple, librokaruselo, kiu
montras specimenojn el la biblioteka kolekto kaj nuboj da temoj aŭ vortonubo. Vortonu-
bo estas vida maniero prezenti la vortojn plej uzatajn ĉe iu retejo, kaj en la kazo de bi-
blioteka katalogo ĝi prezentas la temojn de la libroj tiel, ke la plej oftaj aperas per pli
grandaj litertipoj. Ni aldonis ankaŭ “Citaĵon de la tago” surbaze de la Esperanta por-
verbaro.

Ĉio ĉi eblis danke al la ĝisdatigo de la programo. La funkciado de la antaŭa versio estis
tre malrapida kaj tio vere malhelpis la serĉadon. Cetere, la kunestado de ĉi programo
(Koha) en la sama servilo kie troviĝas aliaj bezonataj programoj ne plene kongruaj kun
ĝi, okazigis ofte paneojn de la aliaj. HEF solvis la problemon akirante plian malgran-
dan servilon por gastigi nur la katalogan programon.

La retkatalogo nun respondas rapide la serĉopetojn. La servo, do, denove estas taŭge
provizata.

Ana Manero

DOKUMENTOJ ALVENITAJ AL LA KATALOGO EN 2022

Dum la jaro 2022 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

Donacinto: Fco. Javier Moleón

Belarta rikolto 2021

Ĉiuj steloj etas nokte, 2021

Donacinto: Miguel Fernández

Fernández, Miguel. *Semente de alvoradas, 2022*

Donacinto: Roberto Garvía

Garvía Soto, Roberto. *Lengua y utopía, 2021*

Donacinto: Willy Nüesch

Schiller, Friedrich. *Elektitaj poemoj, 2007*

Donacinto: Vicente Costalago

Mihalski, Eügeno. *Prologo, 1929*

Sappl, Hanns. *Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan grupon?, 1921*

Steiner, Rudolf. *Kiel mi trovas la Kriston?, 1918*

Hauptenthal, Reinhard. *Enkonduko en la librosociencon de Esperanto, 1968*

Goethe, Johann Wolfgang von. *Torkvato Tasso, 2008*

Schiller, Friedrich. *Don Karlos, 2006*

El la germana poezio, 2010

Hoffmann, E.T.A. *Fraŭlino de Scuderi, 1992*

Menade bal püki bal, 1998

Donacinto: Jorge Camacho

Dobrzyński, Roman. *Verda simio, 2021*

Hoog, H. A. de. *La senpera verbigo de adjektivoj, 1955*

Donacinto: Manuel Parra

Löwenstein, Anna. *Sukcesa mamnutrado, 1995*

Donacinto: Jacinto M. Arévalo Molina

Poesías, marchas y canciones de las Brigadas Internacionales, 2022

Donacinto: Kantabra Esperanto-Asocio

Cent tridek tri tagoj, 1976

Modest, Julian. *Mistera lumo. 1987*

Perkomputila tekstoprilaboro. 1985

Donacinto: Liberano

Aldecoa Calvo, José Serafín. *Esperanto y esperantistas de Teruel, 2021*

Eldonita de HEF:

Gutiérrez Adúriz, Miguel. *Esperanto : curso básico. 3ª ed., 2021*

Akirita de HEF:

López, Fernando J. *La defio vivi kaj krei, 2017*

Sanchis Sinisterra, José. *Ha, Karmela!, 2018*

Trovu ĉi tiujn kaj aliajn dokumentojn en la retkatalogo de Biblioteko Juan Régulo Pérez: <http://biblioteko.esperanto.es/>

LA TUNELO DE LA ENGAÑA

Tiu kiu estis dum multaj jaroj la plej longa tunelo en Hispanio vidis neniun vagonaron trapasi ene de ĝi. Temas pri la tunelo de la Engaña, tiel nomita ĉar ĝi troviĝas apud samnoma rivero. Ĉi tiu tunelo troviĝas inter Kantabrio kaj Kastilio-Leono, ĝuste inter la vilaĝoj Vega de Pas en Kantabrio kaj Pedrosa de Valdeporres en la provinco Burgos. Ĝi mezuras 6976 metrojn. La tunelo estis parto de fervoja-linio projektata, sed neniam realigata, por komuniki Sagunton kaj Santanderon, tio estas, de la Mediteranea ĝis la Kantabra Maro.



La laboroj por la konstruo de la tunelo komenciĝis en la jaro 1941. La konstruantoj estis respublikaj prizonuloj, plejmulte el ili andaluzoj kaj ekstremaduranoj, kondamnitaj en la koncentrejo Valdenoceda. Laŭdire laboris tie 700 prizonuloj kiuj, laŭ dekreto de la diktatoro Franko, reduktis siajn kondamnojn per tiuj laboroj, ĝuste po du tagoj en la kondamno por ĉiu tago da laboro en la tunelo. Ili laboris en pezaj labor-kondiĉoj dum 12 horoj en la tago. Oficialaj statistikoj asertis, ke mortis dum la laboroj 16 homoj, tamen oni povus dubi pri tiu nombro, kiu sendube estis pli granda. Unuamomente la laboro realiĝis pere de fosiloj, ŝoveliloj kaj dinamito, poste alvenis grandaj mekanikaj traborigiloj kiuj inundis la tutan tunelon per pulvoro, kiu sendube difektis la sanon de la laboristoj.



Enirejo en la tunelo ĉe la provinco Burgos

La konstruanta kompanio "Portoles y Compañía" starigis du malgrandajn vilaĝojn por la laboristoj kaj iliaj familioj. Ili ricevis salajron, tamen la mono estis dividita inter la laboristoj mem, la konstruanta entrepreno kaj la karcero. Ili estis konataj en tiu zono kiel "Portoleses", pro la nomo de la konstruanta kompanio. Unuamomente 5 jaroj estis kalkulitaj por plenumi la taskon, tamen fine estis necesaj pli ol 17 jaroj. Same la komenca buĝeto de 63 milionoj da pesetoj, fine fariĝis 367 milionoj.

La laboroj finiĝis ĉirkaŭ la jaro 1960, sed vere fine la tunelo vidis trapasi neniun vagonaron, eĉ oni instalas ene de ĝi neniun relon. Novaj planoj de la tiama registaro provokis la definitivon ne-uzon de la tunelo.



Pun-laboristoj dum la konstruado de tunelo

Dum kelkaj jaroj la tunelo estis ofte trapasita de aŭtomobiloj, kies stirantoj deziris eviti dumvintre la neĝon sur la ŝoseojn, tamen vere la tunelo ne estis aranĝita por aŭtomobiloj. La malbona kvalito de la uzita betono, la ne-ekzistanta bontenado de la strukturo kaj neperfektaĵoj dum la konstruo provokis post kelkaj jaroj oftajn enfalojn. Nuntempe la tunelo estas obstrukcita laŭlonge dum kelkaj kilometroj.

José M. Rodríguez



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

OMAGĜE AL LORCA

Federico García Lorca, andaluza poeto jam universala, naskiĝis en 1898. Tial, en la 125a datreveno de tiu evento, en Hispanio, la tuta jaro 2023 estis proklamita “Lorca’a Jaro”, ene de kiu abundos omaĝoj al li kaj al lia verkaro superba kaj eterna, kiun neniam faŝista kuglo iam ajn povos murdi.

Unu el tiuj omaĝoj, gvidata de la hispana poeto kaj kultura aktivulo Armando Silles McLaney, *okazos la 25an de marto 2023, en la Madrida Ateneo. Partoprenos ĝin pluraj hispanlingvaj poetoj, kiuj deklamos siajn omaĝajn poemojn. Mi havis la honoron esti invitita kiel E-poeto. Tio signifas, ke, kiel kutime jam de pluraj jaroj en tiuspecaj hispanlingvaj aranĝoj, mi laŭpete deklamos miajn poemojn, krom en mia hispanigo, ankaŭ en ilia originala Esperanta formo. Mi ankaŭ interpretos mian E-version de la Lorca’a kanto *Zorongo*. Sed ankaŭ alia esperantisto partoprenos la aranĝon. Temas pri nia bona amiko la prestiĝa andaluza astronomo David Galadí, kiu videe prezentos (kompreneble, hispanlingve) siajn konsiderojn pri la morto de Lorca. Li tion faros surbaze de la fakto, ke parenco lia, la anarkiisma banderilisto Francisco Galadí Melgar, estis murdita kaj entombigita kune kun Lorca ie. Oni ankoraŭ nun ne scias kie! Krome, oni projektos i.a. kurtan filmon pri la poeto, *La camisa blanka* [La blanka ĉemizo], de la kinistino Bego Guerrero.

El la du poemoj miaplumaj, kiujn mi prezentos tiukadre, jen unu: *Federico!*, ero de mia nova poemkolekto, *Semo de matenruĝoj*, nun en eldona preparo far Mondial. Ĉi poemon mi verkis en 2021, kadre de i.a. la 85-jariĝo de la murdo al Lorca:

FEDERICO!

Omaĝe al la poeto super poetoj kaj kompleta artisto Federico García Lorca, 85 jarojn post ol puĉintaj hispanaj faŝistoj murdis lin. Kaj omaĝe ankaŭ al la tradukmajstro Fernando de Diego, en la kvindekjariĝo de la apero de lia nesuperebla Cigana romancaro, esperantigo de unu el la Lorca’aj ĉefverkoj, Romancero gitano.

Miguel Fernández, Cabo de Gata (Almería), la 18an de Aŭgusto, 2021.

*La teksto venis al la redakcio antaŭ ol la omaĝo.

Tiu omaĝo ja sukcese realiĝis, eĉ kun la partopreno de tria esperantisto, Ana Manero, kiu deklamis la poemon *A Federico García Lorca*, de la poeto José Luis Rodríguez Leal.

Jen sur ĉiuj tegmentoj: Federico.
Jen sur ĉiuj ĝardenoj: Federico.
Jen ĉe l' rompitaĵoj: Federico.
Jen ĉe l' perditaj fontoj: Federico.
Jen ĉe l' glaciaj montoj: Federico.
Jen ĉe la blindaj rojoj: Federico.
Jen ĉe l' ter' elfosita: Federico.

RAFAEL ALBERTI

1929

Regadas akra nubo kaj plenluno,
razil' barbira kaj okul' virina.
Razil' barbira kaj frostosmirgita.
Kaj jen la nubo pasas tra la luno
kvazaŭtranĉe.
Kaj la razilo pasas tra l' okulo,
ĝin distranĉas.
En ekstra plano, gelatena ŝpruco
de vitrea humoro.
Jen Andaluza hundo¹,
de Buñuel kaj Dalí.
La hundo, Lorca, foras en Nov-Jorko
prikantanta la negrojn, la reĝon de Harlemono:
la naturon,
ties revolucion kontraŭ la hom-dispremon
far mon-monstro: Wall Street: la potenculoj
blankaj kiel la vestoj de la papo,
kiu iliajn pugojn ade lekas
fronte al hom-amasoj
malsataj kaj malsanaj kaj vunditaj
en mil militoj de la potenculoj.

¹*Andaluza hundo*: esperantigo de originala franca titolo, *Un chien andalou*, de skandala surrealistika silenta filmo verkita (kunlabore kun la kataluna pentristo Salvador Dalí), produktita kaj reĝisorita de la fama hispana reĝisoro Luis Buñuel en 1929. Tiu filmo rigardatas majstraĵo en la historio de kino kaj kulmino de la surrealistika arto. Direblus, ke temas pri bilda poemo, kie, por la unua fojo, aperas portretita la subkonscio. En la libro *La defio vivi kaj krei*, de Fernando J. López, numero 12 de la kolekto *Hispana literaturo*, de HEF, Liberranimo, Teruel, 2017, la editoro, Miguel Fernández, aldonis i.a. sian esperantigon de la originala scenaro de tiu filmo. (*Noto de la aŭtoro*).

Kaj Lorca suprengrimpas sur l' altaĵon
de la ĉielskrapanto Chrysler Building
kaj tie ĉion ĉi al Rom' elkrias.
Lorca prikantas
la samseksaman puron de Walt Whitman
kaj proklamas
amon transe de genroj,
amon, kiu disdonas ĝojokronojn.
Kaj li profetas, ke infano nigra
iam *anoncos al la or-blankuloj*
fine la venon de la spikoregno.

*

Granado, la 18an de Aŭgusto 1936.

Aŭroro tujas.
Preterpasinte la vilaĝon Víznar,
inter olivarbaroj kaj krutaĵoj,
oni povas aŭskulti la murmuron de roĵo.
Ĝi fonte ŝprucas ĉe fabela loko
kiun andalusanoj² nomis *Ajnadamar'*,
tio estas "la fonto de la larmoj".
Matenruĝo sen ruĝo. Jen kvaropo
da homoj, inter ili Federico,
mankatenitaj,
eliĝas nun el aŭto pli nigra ol la morto.
Ili vojas sen scio pri la celo,
plej anxie,
kvazaŭ ien gvidataj de nevidebla mano,
en la lumokonusoj de reflektoroparo...
Subite kuglotondroj
tremigas la ravinojn kaj arbarojn.
Estiĝas la vakuo.

....

Kaj nun... *Ajnadamar'*... priploras Federico'n.
Post nelonge, lamento nekredebla,
terura krio ĝisatingas
eĉ plej lontanajn lokojn de la mondo:
Federico, murdita!!!

1957

La ondo de ĉi krio
iris de monte monten jar-post-jare.
Ĉe Albaicín, mia kvartalo kara,
la sola en Granada,
kiu rezistis kontraŭ la puĉintojn
kaj estis do terure subpremata
– *ho!, en la nokto, tiu kamiono,
kiu haltadas... kie?...*
*... ho, ve, kia missorto!,
ĝuste ĉe la stratpordo viadoma!...*
... insiste oni frapas al la pordo!...
... “Ĉu Pedro López tie?”...
... “Jes... la... filo... sed... kien?...”
*... “Ne zorgu, sinjorino,
temas nur pri plej simpla promenado!”...*
... ..
... Kaj Pedro, ve!, neniam plu revenis... –

la krion oni faris kun sordino.

Sed ĝi certe neniam estingiĝis.
Terasoj ade kriis: Federico!
Ĝardenoj ade kriis: Federico!
Fontanoj ade kriis: Federico!
Ĉiuj ciganaj voĉoj: Federico!
Ĉiuj poetoj-fratoj: Federico!
Same Alhambro, transa: Federico!

...
Kaj eksterlandaj homoj,
tiutempaj turistoj,
demandis nin, bubetojn:
“Kie do kuŝas morta Federico?”

2021

Kie do kuŝas morta Federico???

² Laŭ la oficiala versio, la araboj invadis la Iberian Duoninsulon en la jaro 711. La tuton de la konkerita Iberia regno ili nomis Al-Andalus, esperantigebla per Andaluso, laŭ propono far la esperantisto kaj filologo pri semidaj lingvoj Ricardo Felipe Albert Reyna, (*Lingvo kaj literaturo en Andaluso, Beletra Almanako*, N-ro 6, Oktobro 2009, p. 43). “Andalusano” do estas ano de la ĉefa gento de “Andaluso”. La vorton Andaluso oni devas ne konfuzi kun “andaluzo”, t.e. ano de la ĉefa gento de la nuntempa Andaluzio, regiono ĉe la sudo de Hispanio, kie Andaluso havis sian ĉefurbon, Kordovon, ĝis la 11a jarcento, kaj kie la andalusanoj reĝlando Granada plu vivis ĝis 1492, kiam la Katolikaj Gereĝoj perbatalis ĝin. Entute, la araboj regis ok jarcentojn super pli-malpli grandaj partoj de la Iberia Duoninsulo. (*Noto de la aŭtoro*).

LA STRANGA ANGULO Ĉapitro 8a

Pri kiel venki tian malkomfortigan regulecon de nia komuna lingvo

Estas mi esperantisto. Do, estas mi instruisto pri la lingvo Esperanto.

Ene de ĉiu esperantisto estas kuraĝa lingvisto, kiu laŭ sia propra interpreto bone montras al ĉia homo tion, kiu estas nia komuna lingvo. Ĉar vi kapablas legi kaj kompreni ĉi tiujn vortojn, do mi supozu, ke ĉi tiu teksto estas komunikado inter lingvometodikistoj. Ni ne bezonas diplomojn, titolojn nek atestilojn. Refoje, estas ni esperantistoj.

Profitante de ĉi tiu okazo, lasu min donaci al vi ĵuvelojn pri facila temo ene de nia instruado: la reguleco de nia kara lingvo. Ni scias, ke ene de la pluraj nekompereblaj pozitivajoj de Esperanto estas, ke ĝi ne havas esceptojn, estas tute regula laŭ la vidpunkto de la fonetiko, la morfologio, la sintaktiko kaj la semantiko. Pro tio eŭropdevenaj lernantoj kaj neeŭropdevenaj same facile lernas la lingvon. Sufiĉas scii aron da vortoj kaj malmulte da reguloj por sekve malkovri senfinan vortaron. Ĉu ne?

Esperanto estas tute regula kaj gramatike senescepta lingvo ĉar ĝi funkcias per stabilaj reguloj, kiujn ĉiuj tradukistoj, gramatikistoj, akademianoj kaj ĉefe vortdonantoj sekvas. Utila ekzemplo pri tio estas la profesioj. Pro tio, al komencantoj oni prezentas la regulon, ke se oni profesie P-as, do oni estas P-isto. Ekzemple, la dancisto fakas pri danco kaj la kantisto pri kanto. Sed fakte, tio oftas sed ne ĉiamas. La fakto estas, ke inter si konkeras du reguloj: la isteco kaj la ieco.

Laŭ la isteca regulo, tiu, kies posteno konsistas en kuraci, estas kuracisto. Pri politiko, politikisto. Pri pano, panisto. Same pro tio, vortoproduktantoj enmetis en la paĝojn de la vortaro, ke fakulo pri arkitekturo (aŭ turo de arkitekto, kiu siavice temas pri arkitekto) ne estas arkitekturisto, sed arkitekto.

Laŭ la ieca regulo, se oni unue elektas nomon de profesiulo, poste aldonu la neoficialan sufikson -io. De psikologo -> psikologio; de inĝeniero -> inĝenierio; de lingvisto -> lingvistio... Ho! Ne! Pardonu min, kiu refoje konfuziĝis. La ĝusta vorto estas lingvistiko. Sed ne konkludu, ke simile la fakulo pri komputiko estas komputisto, sed komputikisto. Fakte pluraj fakoj finiĝas per -tiko, kiu ankaŭ ne estas oficiala sufikso, kiel okazas pri gramatiko aŭ botaniko. Botaniko havas sinonimon: plantologio, kiu sekvas la duan regulon, nome la profesio estas plantologo (siavice sinonimo de botanikisto).

Kaj estas la liberaj asocioj, kiel tiu de arkitekto, al kiu oni aldonu profesiojn kiel manaĝero, ŝoforo, poeto aŭ torero. Interesa ankaŭ estas sekretario. Ne, ne temas pri la fako de sekretaro (kiu estus aro da sekretoj), sed pri la fakulo mem. Demando: kiu estas la nomo de la fako? Ĉu sekretaritiko? Ĉu sekretariio? La vortaro ne klarigas pri tio.

Do, vi povas facile senti ke la temo de la fakoj kaj la profesioj estas facile klarigebla kaj lernebla. Fakte plurajn jarojn post lerni Esperanton, mi ankoraŭ lernas novajn senesceptajn reguletojn pri nomoj de fakoj kaj profesiuloj.

Alia temo, kiu scivolemigas min estas la voĉoj de la bestoj. Kiam mi instruas Esperanton, mi kutime prenas la regulojn rilate al ĉio, kiu ĉirkaŭas bestojn, komparante kun mia gepatra. Tiel mi montras la ŝparon, kiu alvenas de vortoj kiel ĉevalo, ĉevalino, ĉevalido, ĉevalaro, ĉevalejo ktp. Sed ni ne diras ĉevalvoĉo aŭ ĉevalbleko sed heno; hundoj bojas, katoj miaŭas, bovoj muĝas, birdoj pepas...

Eble vi multe aŭkultis aŭ legis pri tiuj konkretaj temoj. Sed estas multaj aliaj, kiujn mi malkovras ofte kaj grandigas la neskribitan regulon "Se vi estas tradukisto, bezonas esprimi ion kaj hodiaŭ vi ne havas taŭgan kapon, prenu la vorton el via gepatra lingvo kaj esperantigu ĝin". Mi memoras mian ĝojon malkovrante la magion per kiu, aro da vortoj estas vortaro; aro da ŝtupoj, ŝtuparo; aro da bretoj, bretaro; aro da tirkestoj, komodo... tuko por nazo estas naztuko, tuko por bano, bantuko; tuko por lito, litotuko; tuko por planko, tapiŝo...

Kaj hodiaŭ mi ne mencios la tiklegan aferon pri la lingva traktado de la sekso, ĉar eble vi estas mia amiko (aŭ amikino, ĉar amiko nur povas esti viro, same kiel la menciita sekretario).

Konklude, ni esperantistoj, tio estas lingvinstruantoj, pli bone ne eniru en esceptojn kaj daŭre disvastigu la faman regulecon de nia lingvo. Ĉu?

Viko



ALIĜU AL LA HISPANA KONGRESO: kongreso.esperanto.es

LA MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO EN "LES ISSAMBRES"

25.2.2023 - 4.3.2023



MES estas printempa unusemajna renkontiĝo de esperantistoj en suda Francio en agrabla loko ĉe la Mediteranea maro. Tie ni loĝis en bela hotela restadejo *Val d'Esguière*, antaŭe palaco en la tridekaj jaroj, kaj nun nomata "*Village Club Miléade*". Hotelo kaj la parko estas bone prizorgataj, la personaro estas agrabla. Ĝi estis renovigita, aldoniĝis kelkaj novaj instalaĵoj, ekstera naĝejo, tenisejoj, "Spa"-centro por homa bonfarto (natura kosmetiko, masaĝoj, magnetismo, banoj).

Ĉi-foje kolektiĝis 90 partoprenantoj el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio; patrino kun du ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintinoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo.

Ĉe la alveno, la nova hotelestro bonvenigis nin en la franca lingvo kaj bondeziris al ni agrablan restadon. Li ankaŭ prezentis al ni la ĉefprizorganton de la kuirejo kaj animantimon de la hotelaj aktivajoj. Andreo Grossmann brile tradukis lian paroladon. Poste ni tostis per aperitivo, interkoniĝis kun novaj partoprenantoj kaj gaje dancis farandolon. Ĝi estas provenca ritma viveca ĉendanco, dum kiu la dancantoj manenmane serpentumas inter la publiko. Mi transdonis salutojn al la partoprenantoj de Rosa Lopéz kaj Sol kun Francesc kiuj ne povis ĉeesti la aranĝon. Christine prezentis la semajnan programon kaj la tri instruistinoj nelonge parolis pri instru-metodoj en siaj respektivaj kursoj.

Dum la tuta semajno okazis instruado de Esperanto en tri kursniveleoj: la 1-a por komencantaj parolantoj estis gvidata de Zsófia Kóródy, la 2-a por progresantoj gvidata de Mireille Grosjean, la 3-a pri literaturo gvidata de Spomenka Štimec. Dimanĉon la 26-an de februaro okazis kunveno de la ĝenerala asembleo de Esperanto-Provence. Antaŭ la posttagmezaj kursoj, Svitlana el Ukrainio rakontis pri sia lando, konigis nin pri la historio, kulturo, folkloro, lingvo kaj pri aktualaj okazaĵoj en la nuntempe okupata lando.

Dimanĉe antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por la ĵurnalo *Var-Matin*, en kiu poste estis aperigita artikolo pri nia staĝo, akompanata per la komuna foto. Post la tagmanĝoj estis libera tempo por promenado en la naturo aŭ por partopreni posttagmezajn ekskursojn al vizitindaj lokoj. Estis proponataj vizitoj al *San Peire*, lagetoj de *Villepey*, klostro en *Fréjus*, muzeo en *Saint-Raphaël*. Interesaj estis la vizitoj de abelejo en *Esterel*, de la muzeo de la fera Masko kaj de Reĝa Fortikaĵo en la insulo *St. Marguerite*. Ankaŭ la hotelo proponis aktivadojn en kiuj ni povis partopreni. Iuj preferis kartludi, triki, prilabori broĉojn aŭ tutsimple babili. Carmen, per sia nekutima brodita vestaĵo, propagandis Esperanton per simplaj frazoj. Dum la kafo-paŭzo eblis salteti super la longa turnanta ŝnuro aŭ rigardi foto-albumojn pri pasintaj renkontiĝoj en *Les Issambres*.

Vespere, kiel kutime, okazis diversaj prelegoj. La unuan vesperon Mireille Grosjean prezentis diversajn stilojn de arkitektoj. "Arto, lingvo - ĉu paraleloj eblas?" En la lunda vespero ni spektis filmon pri abeloj kaj Philippe Chavignon rakontis pri bredado de abeloj pri kio li estas fakulo. La postan tagon ni vizitis liajn abelujojn en la naturo kaj povis aĉeti mielon. Sekvantan vesperon Spomenka Štimec parolis pri la ĉeĥa juddevena kaj denaska esperantista knabo Petr Ginz, kiu famiĝis pri sia desegnaĵo de "La Tero vidata de sur la Luno", kiu aperis ankaŭ sur ĉeĥa poŝtmarko. Merkrede, post la vizito al Margarita insulo, kiun la organizantoj donacis al ni senpage, Hannes Larsson prezentis sian libron pri dulingva (angla kaj franca) krimromano en kiu Esperanto ludas rolon por propagandi ĝin al la publiko. Ĵaŭde vespere Mireille kaj Spomenka parolis pri Hektor Hodler kaj pri lia patro, fama pentristo.





Dum la lasta vespero okazis loterio en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero estis dediĉita al prezentadoj de diversaj kantoj, skeĉoj kiujn la partoprenantoj mem pretigis. Aperis plurlingva sceno de vulpo kaj korvo, tri friponoj, fiŝvendisto, problemo kun lavmaŝino ktp. La plej amuza estis sceno pri ebrulo inspirata de la poemo de William Auld "Ebrio". Ĉe la fino prezentigis la ĥoruso de Bernard Bigonnet. Sekvis dankoj al la organizintoj kaj al la instruistoj. Muziko de

saksofonoj kaj akordionoj dancigis la partoprenantojn ĝis la noktomezo.

Sabate matene jam pluraj samideanoj adiaŭis nin kaj revenis al siaj hejmoj. Tamen daŭris la kurso de Spomenka, kaj en la apuda salono Nina el Rusio prezentis al ni rusajn pentristojn: Vassily Kandinsky, Kasimir Maleviĉ, Marc Chagall kaj Konstantin Vasiliev.



Jam la 15-an fojon la

Esperanto-grupo de St. Rafael kaj Frejŭs sub la gvido de Monique Prezioso kaj de Christine Graissaguel kun pliaj helpantoj organizis MES, laŭdire la lastan. Tamen estas espero, ke novaj organizantoj transprenos la taskon por daŭrigi la printempan tradicion de tiuj agrablaj semajnoj.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la aranĝo, pri kiu ĉiuj estis kontentaj kaj strebis al la progreso de sia lingvonivelo. Ni ricevis multajn valorajn informojn pri Esperanto-kulturo. Speciala danko ricevu la tuta familio de Monique Prezioso, kiu multe helpis en la organizado kaj dum la aranĝo mem.




Liba Gabalda

MATEMATIKA ANGULO (10)

La teoremo de Pitagoro

La Teoremo de Pitagoro eble estas la plej fama kaj vaste konata el la matematikaj teoremoj.



Ĝi asertas ke “en orta triangulo, t.e., triangulo, unu el kies anguloj estas 90-grada, troviĝas jena rilato inter la lateroj:

$$H^2 = K^2 + k^2$$


La laterojn de la orta angulo, “K” kaj “k”, oni nomas “katetoj”.

La lateron kontraŭan al la orta angulo, “H”, oni nomas “hipotenuzo”.

Ekzemple, en orta triangulo, kies lateroj mezuras 3, 4, 5 ni havas:

$$3^2 = 9 \quad 4^2 = 16 \quad 5^2 = 25$$

Sekve, $5^2 = 4^2 + 3^2$




Kiel okazas de tempo al tempo en Matematiko, homo kiu donis sian nomon al teoremo, ne estas la elpensinto de tiu teoremo. Tio okazas ankaŭ kun Pitagoro. “Lia” teoremo estis konata jam en la antikva Egiptujo, antaŭ ol la naskiĝo de Pitagoro. Laŭŝajne tiuj praaj egiptoj ne kapablis elpensi teoremon kun ĝenerala valideco, t.e., valida por kiu ajn orta triangulo, sed nur por konkretaj trianguloj. Estis la geniaj grekoj, kiuj kapablis elpensi ĝeneralajn regulojn, ne nur en Matematiko.

La graveco de la Teoremo de Pitagoro montriĝas per ĝiaj multnombraj sekvoj kaj aplikoj al multaj aferoj, ne nur ene de Matematiko sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo.


Ĉi tie ni elmetos du kuriozaĵojn, kiuj rilatas al tiu ĉi teoremo kaj kiuj eble estas ne tro konataj.

La unua aludas al tio, ke la antikvaj grekoj ne konis la modernan notacion por prezenti potencojn, t.e., la multipliko de kelkaj numeroj egalaj (ekz. $2 \times 2 \times 2 \times 2 = 2^4$). Por ili $5^2 = 5 \times 5$ estis la areo de kvadrato, kies kvar lateroj mezuras 5. Same, por ili, $5^3 = 5 \times 5 \times 5$ estis la volumo de kubo, kies tri dimensioj mezuras 5. De tie venis al ni la vortoj “kvadrato” kaj “kubo” por la dua kaj tria potencoj.

Tial ili ne esprimis la teoremon kiel oni faras nuntempe: $H^2 = K^2 + k^2$ sed pere de geometria reprezento:




Kaj kion ili asertis estis jeno:



Nun la dua kuriozaĵo:

Ni desegnu kvadraton, kies lateroj mezuras 1 kaj ni ankaŭ desegnu unu el ĝiaj du diagonaloj (D) (Diagonalo: segmento, kiu ligas du nenajbarajn verticojn de plurlatero).



Laŭ la teoremo de Pitagoro, oni povas kalkuli la mezuron de tiu diagonalo:

$$D^2 = 1^2 + 1^2 = 1 + 1 = 2$$

El tio,

$$D = \sqrt{2}$$

Ni havas tiun segmenton, “D”, antaŭ niaj okuloj en la desegno. Laŭŝajne, temas pri normala linio, facile desegnebla. Tamen, ne estas tiel normala.

Se ni elektas mezurunon (ekz., 1 metron), tiu linio estas nemezurebla. Tio signifas ke ni povas dividi kaj dividi tiun metron por havi decimetrojn, centimetrojn, milimetrojn, ktp., ktp. ... kaj neniam ni sukcesos havi la du punktolimojn de “D” ĝuste sur du el tiuj dividoj.

Por la tiamaj grekoj tio estis vera ŝoko. Tiel granda ŝoko, ke kiam aperis aliaj similaj nombroj, ili iamaniere apartigis ilin sub la nomo “neraciaj”, do nombroj, kiuj ne havis lokon en racia normala menso.

Sed por ilin pli ŝokigi aperis pli da tiaj nombroj ... la plej fama el tiuj “neraciaj” nombroj estas Π (Pi), ege familia al ni ĉiuj malgraŭ ĝia “neracieco”. Eĉ laŭ kelkaj aŭtoroj, tiu nomo estis omaĝo al Pitagoro (Πυθαγόρας) ĉar temas pri la komenclitero de lia nomo.

Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com



81-a Hispana Esperanto-Kongreso

Sevilo

12-a de oktobro – 15-a de oktobro 2023

ALIGILO

Nomo Familinomo(j)

Adreso

Urbo Lando

Retadreso Telefonnumero(j)

Identiga karto/pasporto Movkapabla handikapeco jes ne

KOTIZO

Dato de pago⁽¹⁾

- Ĝis la 30-a de aprilo 70 €
- 1-a de majo – 30-a de junio 80 €
- Ekde la 1-a de julio 90 €

Rabatoj pro rilato kun HEF, AEU aŭ SEA

- Membro de HEF, AEU aŭ SEA -10 €
- Familiano akompananta de membro -15 €
- Kaj membro kaj familiano akompananta -20 €

Rabatoj pro juneco

- 17–30 jarojn aĝa -15 €
- 0–16 jarojn aĝa senpaga aliĝo

Kongresa memvola mondonaco

- Donaco (bv. indiki la kvanton) €

Sume €

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

Pagmaniero:

Transpago al *Asociación Sevillana de Esperanto*: IBAN ES04 0182 0404 1402 0158 5771

Noto pri personaj informoj: via nomo kaj devenloko aperos en reta listo de aliĝintoj kaj en kongreslibro; vi rajtas sugesti la manieron sub kiu ĝi aperu. Via retadreso aperos en listo disdonebla al aliaj kongresanoj, sed vi rajtas peti ke ĝi ne aperu. Ceteraj informoj estos utiligataj nur por internaj celoj.